# La *Voĉo de Amikejo*

Informilo pri ***Senlime*** kaj **Esperanto** en Eŭregiono Mozo-Rejno

Sendita al :

BELGIO NEDERLANDO GERMANIO E

*Senlime*

Esperanto-Asocio en Eŭregiono Mozo-Rejno
Avec le soutien de la Communauté française

**En cas de non-distribution, renvoyer à**
H. Lentzen
Feldweg 20
BE-4701 KETTENIS
Tel. xx-32-(0)87-55.43.26
E-mail : lentzen@senlime.org

**Editeur responsable**
**Responsa eldonanto +**
**Informoj en la franca lingvo:**
Tel. +32-(0)87/33.02.92
GSM +32-486-947.957
Mail: jacques@senlime.org
J.-M. Jacques, 5 rue J. Wauters
Esperantista Grupo de Verviers
BE-4800 VERVIERS

**Informatie in het Nederlands**
**Informoj en la nederlanda:**
Tel. xx-31-(0)43-455.14.36
Mail: parren@senlime.org
P.H.H. Parren, Heimansstr. 16
NL-6285 AM EPEN

**Informationen auf deutsch**
**Informoj en la germana:**
Tel. xx-49-2406-7809
Mail: hogen@senlime.org
K. Hogen, Schütz-v-Rode-Str. 43
DE-52134 HERZOGENRATH

**Aperas kvarfoje en jaro kaj rete elŝuteblas ĉe www.senlime.org**

**Prezoj por BE, NL kaj DE :**
**Unuopa n-ro : 3 EUR**
**Jara abono : 10 EUR**

Bonvolu pagi, prefere decembre aŭ januare, **NUR** al la konto :
**979-5327148-10**
IBAN : BE41 9795 3271 4810
BIC : ARSPBE22
(banque : Argenta)
de ***Senlime***, 25 rue Pierre Fluche, 4800 VERVIERS, Belgio.

La kotizo (nedeviga sed bonvenigata) estas disigita de la abono al la papera versio de tiu-ĉi informilo (kompreneble pagenda).

## *Ni invitas vin al Trilanda Renkontiĝo en Bonn (DE), sabaton, la 23an de majo 2009.*

**DEVIGAj aliĝo kaj pago NEPRE antaŭ** la 7a de majo (aliĝilo p. 7).
Prezo: 18 EUR (10 EUR por individuaj partoprenantoj = sen vojaĝ-kupono: se vi mem veturos al/en Bonn), tagmanĝo ***ne*** enkalkulita.

**Programo** (principe definitiva sed modifebla kaze de neceso)

- 9h00 Rendevuo en Aachen-ĉefstacidomo, kajo 8
- 9h10 Trajna foriro al Siegburg (alveno: 10h44)
- 10.54 ek de Siegburg: tramo 66 al Bonn (gvidado far' Trude Sinno)
- 11.15 alveno en BONN (urblimo), 15-minuta promeneto al kafejo KLOSTERPFORTE, Karmelkloster 1, kie ni **tagmanĝo**s.
- 13.00 Foriro al la centro (busa)
- 13.30 Vizito de la **katedralo** (Münster) - promeneto tra la urbcentro
- 14.00 Vizito de **Beethoven-muzeo**
- 14.45 **Promenado** laŭlonge de la rivero Rejno ĝis la iama registara distrikto kaj la HAUS DER GESCHICHTE (Historia Domo) kiun ni vizitos kaze de pluva vetero.
- 16.30 **Kafotrinkado + kuko** en restoracio "CASSIUS GARTEN" (proksime de la stacidomo)
- 17.32 entrajniĝo (en Kolonjo alveno je 18.01 + foriro al Aachen 18.17)
- 19.09 (aŭ 19h47 kaze de malfruo) Alveno kaj fino en Aachen.

Individua **loĝado** eblas

**En Aachen :**

- Junulargastejo (Jugendgästehaus), Maria-Theresa-Allee 260, 52074 Aachen, T 0049-241-71101-0. Trovebla ankaŭ rete. Bezonatas junulargasteja legitimilo. Kostoj por pli aĝaj ol 27 jaroj: plurlita € 23,20, 1-persona € 37.-, 2-lita € 28,70 (inkl. matenmanĝo).

- Alternative: (malgranda) Pension HALTER: Karl-Marx-Allee 144, 52066 AC (proksime al la stacidomo). € 19/24 p/p. sen manĝo, provizita kun kuirejeto, T 0049-241 65541.

**Aliloke :** eblos resti la nokton en Bonn aŭ eventuale alia urbo pere de la pasporta servo. Vidu ankaŭ hotelojn en Vervierso (fine de) p. 6.

N-B : ***Senlime*** ***NE*** mem organizas/peras tranoktadon.



# Niaj programeroj lupee

## *detaloj pri anoncitaj prelegoj, vesperoj, festoj,…*

**Paradiza ĝardeno vintre**

Eble kiel mi vi ne ŝatas la vintron kaj la malvarmon, kaj dume preferus vintrodormi, precipe se la vetero – kiel ĉi-jare – estas iom dura. Sed kiu diris ke la vintro estas morta sezono ? Ke dum kvin monatoj, de novembro ĝis marto, la ĝardenon oni senzorge forlasu ?

De la belaj aùtunaj foliaroj ĝis la vintraj floroj kun surprizigaj koloroj, preterpasante la viglajn tuŝojn de la beroj, la naturo prezentas al la ŝatanto, kiel José **Jacob** (emerita profesoro pri biologio), ĝardenon vivantan kaj altkolorigitan ankaù dum vintro !

Pasintjare ni vidis ĝin dum somero, nun li admirigos al ni per multaj belegaj lumbildoj variajn vegetalajn speciojn kiuj florumas dum la malvarma sezono : plantoj jaraj, bulbaj, staùdaj aù grimpantaj, sed ankaù plej rimarkindaj arbetoj.

Plian fojon, José Jacob ne superŝutos nin per sciencaj klarigoj kaj ĝardinadaj konsiloj sed ĉefe promenigos nin tra lia ŝatata ĝardeno por simple admiradi la riĉecon de la dumvintra naturo. Nepre ne malĉeestu la spektaklon, aparte belegan kiel konfirmos tiuj, kiuj ĉeestis la unuan parton.

Kaj subŝtofitaj botoj, gantoj, ŝultrotuko, kaj tiel plu ne necesos en nia bone hejtigita kunvenejo : venu !

**04-17** 19h30 BE-Kelmis, Select: "***Mia vintra paradiza ĝardeno***", prelego de José Jacob, kun lumbildoj.

**Kiom belas nia naturo**

Inter oktobro 1972 kaj decembro 2005 – kiam tiumonate li decidis ĉesigi – Raymond **Demarche** estis agnoskita prelegisto en la provinco Lieĝo.

Li rajtis komentarii siajn lumbildojn en la franca lingvo (estis normale) sed plie en esperanto. Tiel li estis pagita same kiel dum franclingva prelego.

Li plurfoje faris tion. Cetere Sinjorino **Vertongen** (✞) kelkfoje alvokis lin en la kadro de la ***Klerigaj Aferoj Provincaj***.

Vi scias ke li vojaĝis en dekoj da Ŝtatoj sur nia terglobo. Ofte aventureme.

Multfoje li projekciis lumbildojn pri iu aù alia lando vizitita, dum kunvenoj en Verviers, Liège, La Calamine. Ĉiam en esperanto.

Por la 15a de majo R. Demarche elektis centon da lumbildoj – kiujn li montros per sia malnova projekciilo – inter bildaro de tri guberniaj temoj. Tiel vi vidos pejzaĝojn, bestojn, bestetojn, florojn,...

Li aùdacas aserti ke estos ravo. Ĉu li pravos?

Via ĉeesto, via opinio post la projekciado estos do gravaj.

**05-15** 19h30 BE-Kelmis, Select: "***Kiom belas nia naturo***", prelego de Raymond Demarche, kun lumbildoj.

**Plia karaoke-vespero**

Estas nun konate (ĉu ne ?) ke ***Senlime*** regule organizas sian propran karaokeo-n en Kelmis, fine de junio, agrabla maniero ĝisrevidi fine de la lerneja jaro.

Karaoke kompreneble ne havas nur ludan celon, ĝi ankaù havas grandan kulturan voloron, se oni konsideras ke ĝi permesas konatigi eksterlandajn kantojn (kaj tiele kulturon) enlande… kaj inverse.

Sed eĉ plie ni povas konatigi la esperantistan kulturon kaj lingvon al neesperantistoj. Tiel karaokeo fariĝas lingvo-instruilo.

Tial, komplemente kaj enkonduke al nia karakea festo, Jean-Marie **Jacques** prezentos al vi kelkajn ekzemplojn pri tia pedagogia uzo de karaokeo, ĉerpitajn el la iama "***lingvo-plano***" de **Esperantista Grupo Verviers** ĉe diversaj liberaj radioj : kantoj en esperanto estis aùdigitaj kaj la tekstoj klarigitaj (oni esperis, sed ne sciis ĉu la aùskultantoj hejme rekantos la kanton… hodiaù, tiuj kantoj akiris karaokean formon).

Jean-Marie Jacques, kiu jam gvidis (kaj kreis) diversajn kursojn nun celas prezenti esperanto-kurson por muzikemuloj (kiu ne ŝatas muzikon?), ĉefe pere de karaokeoj.

Poste, vi kiel kutime rajtos laùplaĉe elekti kelkajn kantojn el nia vasta kolekto.

**06-16** 19h30 BE-Kelmis, Select: karaokeo.

# ESPERANTO✪

## Eŭregiona kalendaro 2009 (1/2)




***Senlime*** publikigas, por siaj membroj, agendon pri la esperanto-aranĝoj en la Eŭregiono Mozo-Rejno. Ĝi aperas rete kaj papere.

« Trilandaj renkontiĝoj » estas organizitaj de kiu ajn esperantisto aŭ esperanto-grupo en Eŭregiono Mozo-Rejno interkonsente kun la komitato de ***Senlime***. Principe ili okazu dufoje en jaro (printempe kaj aŭtune), laŭvice en ĉiu el la tri landoj (BE, DE, NL).

Tiu-ĉi agendo eventuale povas enhavi programerojn de lokaj grupoj aŭ aktivaĵojn organizitajn aŭ subtenitajn de komitatanoj. Ĝi neniel iĝu kompleta kalendaro de esperanto-aranĝoj (aliaj ekzistas).

La Kelmis-aj kunvenoj de la grupoj de ***Senlime*** nun regule okazas ĉiun trian vendredon de monato en kultur-centro "Select", Lutticherstr. 264.

Por kiu ajn propono pri kunlaboro, ĉiam ege bonvena kaj atendata, bonvolu kontakti, prefere rete kaj kiel eble plej frue, la responsulon pri la kalendaro : Jean-Marie **Jacques** (jacques@senlime.org).

**01-16** 19h30 BE-Kelmis, Select: "***Novaj karaoke-aĵoj de Senlime***", prezentitaj de J-M. Jacques.
Inf. jacques@senlime.org

**02-20** 19h30 BE-Kelmis, Select: **Ĝeneralaj Asembleoj de *Senlime* kaj V.E.G.** (kaj labor-kunveno).
Inf. jacques@senlime.org

**03-20** 19h30 BE-Kelmis, Select: "***Simboloj de judaismo***" (prelego de M. Schrymecker).

**04-17** 19h30 BE-Kelmis, Select: "***Mia vintra paradiza ĝardeno***" (prelego de José Jacob, kun lumbildoj).

**05-15** 19h30 BE-Kelmis, Select: "***Kiom belas nia naturo***", prelego de Raymond Demarche, kun lumbildoj.

**05-23 Trilanda renkontiĝo en Bonn** (komuna foriro el Akena stacidomo je la 9-a h).
Inf. jacques@senlime.org

**06-19** 19h30 BE-Kelmis, Select: nune tradicia **karaoke**.
Inf. lousberg@senlime.org

Pliaj kunvenoj en BE-Kelmis, Select, okazos la: **09-18, 10-16, 11-20** kaj **12-13** (Zamenhof-festo).

**16-01** 19h30 BE-Kelmis, Select: ***"Nouveautés-karaoke de Senlime",*** présentées par J.-M. Jacques.
Inf. jacques@senlime.org

**20-02** 19h30 BE-Kelmis, Sélect: **Assemblées générales de *Senlime* et V.E.G.** (réunion de travail).
Inf. lousberg@senlime.org

**20-03** 19h30 BE-Kelmis, Sélect : "***Symboles de judaisme***" (conférence de M. Schrymecker).

**17-04** 19h30 BE-Kelmis, Sélect: "**Mon jardin paradisiaque l'hiver**" (conf. avec diapositives par J. Jacob).

**15-05** 19h30 BE-Kelmis, Sélect: "***Comme est belle notre nature***", conf. avec diapositives par R. Demarche.

**05-23** "**Trilanda renkontiĝo**" **à Bonn** (départ de la gare d'Aachen à 9 h).
Inf. jacques@senlime.org

**06-19** 19h30 BE-Kelmis, Select: traditionnel **karaoké**.
Inf. lousberg@senlime.org

Réunions suivantes au Sélect, La Calamine (BE), les: **18-09, 16-10, 20-11** et **13-12** (fête Zamenhof).




**ODO AL ĜOJO – Eùropa Himno**
(karaoke de ***Senlime***)

***Kantu kune amikaro,***
***ni la ghojon festas nur,***
***nek rivero nek montaro***
***plu landlimoj estas nur.***
***Ho Eùropo, hejmo nia,***
***tro daùradis la divid'***

***Nun brilegu belo via,***
***chiu estas via id'.***
***Via flago kunfratigas***
***Homojn post milita temp',***
***via legho nun kunigas***
***civitanojn en konsent'.***

***De l' Malnova Kontinento***
***jhus ekstaris la popol';***
***gvidas ghin tre nova sento***
***kaj kuniga forta vol'.***
***Sub la shildo de la juro***
***ni vivados en konkord'.***

***Tio estas nia jhuro:***
***unu land' kaj unu sort'.***
***Jen ekzemplo por la mondo:***
***jen direkto, jen la voj':***
***tuthomara granda rondo***
***en la paco, en la ghoj'!***

***Jen ekzemplo por la mondo:***
***jen direkto, jen la voj':***
***tuthomara granda rondo***
***en la paco, en la ghoj'!***

laù: L'INNO EUROPEO
Umberto Broccatelli

**Ludoviko BETOVENO**

Ludwig van BEETHOVEN, en Esperanto ankaù nomata Ludoviko BETOVENO (naskiĝis la 17an de decembro 1770 en Bonn, mortis la 26an de marto, 1827), estis germana komponisto de klasika muziko, la superreganta muzikisto en la transira periodo inter la klasika kaj romantika epokoj. Li estas vaste rigardata unu el la plej grandaj komponistoj. Lia reputacio inspiris kaj en kelkaj okazoj timigis komponistojn, muzikistojn, kaj aùskultantarojn, kiuj venis post li.

**Muzika stilo kaj novigaĵoj**

**Beethoven** estas rigardata kiel transira aganto inter la klasika kaj romantika epokoj de eùropa muzika historio. Rilate muzikan formon, li konstruis sur la principoj de sonata formo kaj motiva disvolvado, kiujn li heredis de **Haydn** kaj **Mozart**, sed multe ilin etendis, verkante pli longajn kaj ambiciajn movimentojn. La verkado de la meza periodo de Beethoven estas honorata pro sia ofte heroeca esprimo-maniero, kaj la verkoj de lia Malfrua periodo pro sia intelekta profundeco.

**Personaj kredoj kaj ties muzika influo**

Beethoven tre ŝatis la idealojn de la klerismo kaj de la kreskanta romantikismo en Eùropo.

Li unue dediĉis sian trian simfonion, ***la Eroica*** (itale: "heroa"), al Napoleono, kredante ke la generalo daùrigos la demokratiajn kaj respublikajn idealojn de la Franca Revolucio, sed en 1804 elstrekis la dediĉon post la evidentigo de la imperiismaj ambicioj de Napoleono, ĝin anstatauigante per "al la memoro de granda homo".

La kvara movimento de lia Naùa simfonio prezentas ellaboritan ĥoran enmuzikigon de la **Ŝiller**a odo ***An die Freude*** ("Al la ĝojo"), optimisma himno, kiu batalas por la gefrateco de la homaro.

Pri la religiaj kredoj de Beethoven kaj ilia influo al lia verkado ekzistas diversaj opinioj inter la sciencistoj.

El VIKIPEDIO
La Libera Enciklopedio

# "Al la ĝojo" de Friedrich SCHILLER

**elgermanigis Kálmán KALOCSAY**

**La mondo de Schiller estas nura alta flugo, mondo de la formo, spirito kaj devo. Li reprezentas unurilate la supron de la germana klasika idealo: sopiro kaj abstraktemo, klasika formperfekteco, kiu formiĝas en la flamo de la batalanta animo.**

**Ne estas hazardo, ke el la odo al la ĝojo kreiĝis la 9a Simfonio de Beethoven(1). Kaj kio decus pli konvene kiel enkonduko de tiu ĉi numero okaze de la baldaŭa kongreso en Majenco ol la majstra traduko de la Odo kun siaj neforgeseblaj versoj: "*Ĉiuj homoj sentas frate se vi ŝirmas per flugil'.*"**



Ĝoj'! Fajrero belradia!
Elizea difilin'!
fajrebrie ni al via
templo iras, preĝi vin.
Ĉesu, de vi sorĉligate
de l' rigora mod' la ŝir',
ĉiuj homoj sentas frate,
se vi ŝirmas per flugil'.

Ĥoro:
Jen brakumoj al milmiloj,
Jen ĉi kis' al tuta mond'!
Fratoj! super stela rond'
loĝas patro por ni, filoj!

Se la granda ĵet' bontrafis
kaj amikon gajnis vi,
se virina am' vin ravis:
Vin enmiksu kun ĝojkri'!
Jes, se eĉ nur unu koro
estas via en la mond'!
Kaj se ne do vin kun ploro
ŝtelu for el nia mond'.

Ĥoro:
Ĉiu sub ĉielo glata
donu sin al simpati',
al la steloj gvidas ĝi,
kie tronas Nekonata.

Ĉiu sur la brust' Natura
suĉas sukon de la ĝoj'
kor' malbona, koro pura
sekvas ŝin laŭ roza voj'.
Ŝi vinberojn, kisojn donas
kaj amikon sen pridub',
en volupt' la vermo dronas,
vidas Dion la kerub'.

Ĥoro:
Ĉu genuas vi, milmiloj?
Vi kreinton sentas, mond'?
Serĉu super stela rond',
loĝas Li trans astrobriloj!

En eterno de l' Naturo
Ĝojo estas la risort'.
En la mondhorloĝ' por kuro
radojn pelas ŝia fort'.
Ŝi el ĝermoj logas berojn,
sunojn regas ŝia gvid'
Ŝi tra l' spaco rulas sferojn
trans la astronoma vid'.

Ĥoro:
Kiel sur la pompaj vojoj
sunoj sur la firmament',
gaje marŝu, frata gent',
kiel venki la herooj!

Esploriston ŝi alrid'as
el la fajrspegul' de l' Ver',
sur krutaĵ' de l' Virto gvidas
ŝi la homon de toler',
sur KredMonto sunobrila
flirtas ŝia flag' el or',
ŝin tra l' fendo ĉerkkovrila
vidas ni en anĝelĥor'.

Ĥoro:
Ho toleron, paciencon,
fratoj, por pli bona mond'!
Donos super stela rond'
granda Dio rekompencon!

Ĉu pripagi diojn? Vanto!
Ĉu simili? Bela pen'!
Venu ĝoji kun ĝojanto
la mizero, la ĉagren'.
Venĝ'? Kolero? En forgeson!
Jen pardon' al malamik'!
Liaj larmoj havu ĉeson,
lin ne boru pentopik'.

Ĥoro:
En ŝuldlibroj plu nenio!
Mondon regu harmoni'!
Fratoj! Kiel juĝis vi,
tiel juĝos pri vi Dio!

Ĝojo ŝaŭmas en pokaloj,
en orsango de l' vinber',
mildon trinkas kanibaloj,
heroecon malesper'.
Se rondiras la botelo,
fratoj, saltu el la sid',
ŝprucu ŝaŭmo al ĉielo:
Jen ĉi glas', por BonSpirit'!

Ĥoro:
Himnas Lin abismo stela,
sera far' kun glora cit'.
Jen ĉi glas' por BonSpirit',
supre, trans la tend' ĉiela!

En suferoj: firma forto,
al senhelpaj: ŝirma brust',
eternec' al ĵura vorto,
eĉ al malamiko: just'.
Virfiero kontraŭ tronoj,
kvankam sangon kostu spit',
al merito estu kronoj,
kaj pereo al insid'!

Ĥoro:
Fermu vin en sankta rondo,
Ĵuru do kun glasolev',
pri l' fidelo al la Dev',
je l' Reganto de l' StelMondo

*Norda Prismo*, 58/2, paĝoj 6566

(1) kies parto fariĝis «Eùropa Himno» (p.4).

# Verviersa Angulo

## Verviersa Esperanto Grupo

**Comité de V.E.G.:**

Président: J. Jacob
19 Chemin de la Rostibouhaye
4910 POLLEUR (THEUX)
Tél. 087/22.10.79

Trésorier: D. Lousberg
25 Rue Pierre Fluche
4800 VERVIERS
Tél. 087/ 087/222030

Secrétaire: J.M. Jacques
5 Rue Joseph Wauters
4800 VERVIERS
Tél. 087/33.02.92

V.E.G. dépend de l' Association pour l'Espéranto (A.P.E.)
M. Delforge
16 Rue des Glacières
6001 MARCINELLE

---

**Cotisations**

Les espérantistes et sympathisants sont cordialement invités à soutenir notre programme d'action en versant dès aujourd'hui l'une des cotisations suivantes au compte
n°: **000-0245571-64**
IBAN: BE29 0000 2455 7164
BIC: BPOTBEB1
(Banque de la Poste)
de:
Esperanto grupo
25 Rue Pierre Fluche
BE4800 VERVIERS

*La cotisation de **Senlime** est maintenant facultative et laissée à l'appréciation de chacun (mais l'abonnement à ce bulletin en version «papier» reste payant : 10 €).*

**D'avance, merci à tous !**

**A.P.E. 2009** (EGV) **14 €**
**U.E.A. 2009** (MA) **59 €**
***Senlime*** **(abonnement 2009) 10 €**

**en indiquant le nom du membre cotisant, le bénéficiaire, l'année *«cotisation de …. pour ….».***

# NOUVEAU:

# *HÔTEL VERVIERS*

**L'espéranto à Verviers a toujours souffert du manque de structures d'accueil pour les visiteurs étrangers… Même si ce nouveau complexe hôtelier risque d'être largement au-dessus de nos moyens, il n'en reste pas moins qu'il ne manquera pas d'améliorer la capacité d'accueil de notre ville, à notre avantage.**

**11 suites présidentielles...**

En cours d'aménagement dans l'entrepôt des douanes de l'ancienne gare de Verviersouest (entre le cinéma et les magasins d'usines), l'***Hôtel Verviers*** (ce sera son nom) ouvrira ses portes le 8 août prochain, un mois avant le grand-prix de ***Formule 1*** à Francorchamps et le festival musical ***Fiestacity***.

L'emplacement est stratégique : à proximité de la sortie d'autoroute, d'un centre commercial, d'un cinéma et du centreville.

Ce sera le plus grand hôtel verviétois, avec un total de 102 chambres: 4 singles, 42 standards, 40 standards supérieures (duplex avec mezzanine), 5 suites business et 11 suites présidentielles.

Ce 4 étoiles, qui recrute du personnel affichera des prix de 95 à 150 € la nuitée.

**Emplois, photos** de la (re)construction et **infos** sur le site internet provisoire (en anglais français – néerlandais… ***mais*** ni allemand ni espéranto ! ) :
**www.hotelverviers.be**

Contact provisoire : *Hôtel Nivelles Sud*, 22 Chaussée de Mons, 1400 Nivelles (067 21 87 21).
Email : nivellessud@valk.com

**...et un resto, "L'Entrepôt"**

L'hôtel (avec piscine extérieure reliée à une salle de fitness et une salle de relaxation accessibles à tout public) ouvrira dans le même temps un restaurant, avec bar, qui s'appellera "***L'Entrepôt***".

Au menu, il y aura:
- 6 buffets différents, de 23 € (le Champs Élysées) à 45 € (le Buckingham Palace), et un buffet à thème le samedi soir (25 €);
- 10 menus, portant le nom de divinités grecques, de 23 € (l'Athéna) à 68 € (le Mille et une nuits), hors boissons;
- un brunch du dimanche midi (25 €).

**Dix salles polyvalentes**, avec une capacité maximale de 300 personnes chacune, nous accueilleront lors de nos banquets et séminaires (fête Zamenhof, trilanda renkontiĝo,...).

---

Restent aussi **à votre disposition** à Verviers :

Hôtel *Amigo*, 1 rue Herla, 4800 VERVIERS (087 22 11 21)
Hôtel des Ardennes, 15 pl. de la Victoire, 4800 VERVIERS (087 22 39 25)
Hôtel *Le Midi*, 9 rue du Midi, 4800 VERVIERS (Petit-Rechain 087 32 17 50).

# *Senlime* - Aliĝilo kaj Aniĝilo

1. Tiu-chi dokumento validas ekde la 1a de januaro 2009, ghis kontraùa averto, kiel alighilo por kiu ajn arangho de ***Senlime*** (trilanda renkontigho, Zamenhof-festo,…) kaj kiel anighilo por ighi membro (membreco principe estas dumviva sed regule kotizinta membro rajtas eksighi chiujare).
2. Kaze de anigho al ***Senlime*** la limdato estas la 30a de junio de la koncernata jaro kaj la dato de la repago de la kotizo chiu unua de januaro (la aligho kiel simpatianto estas senpaga – la eventuala abono al la papera informilo de ***Senlime*** estas krome pagenda).
3. Chiam pagu al la konto **979-5327148-10** (IBAN : BE41 9795 3271 4810 - BIC : ARSPBE22 - banque : Argenta) de ***Senlime***, 25 rue Pierre Fluche, 4800 VERVIERS, Belgio.
La paganto klare indiku la celon de la pago, ekzemple: "Kotizo ***Senlime*** 2010 por x x x **nomo** x x x".
4. **NUR** junuloj (<26 j.) kaj niaj (regule) kotizintaj membroj ghuas (20%) rabaton okaze de partopreno en ***Senlime***-arangho kaj abono al nia surpapera informilo «***La vocho de Amikejo***». Memoru, ke ne-membroj de Eùropa Komunumo **JA** rajtas esti membroj de nia asocio sed **NE** rajtas ricevi de ni paperajn informojn (kiuj rete senpage elshuteblas).
5. Chiu an/al-ighanto nepre kompletigu apartan dokumenton (aù kopion) kaj resendu ghin antaù la limdato al la ghenerala sekretario de ***Senlime*** : Jean-Marie **Jacques**, 5 rue Wauters, BE-4800 VERVIERS, ☎ (xx-0)**87/33.02.92** (💻 jacques@*senlime*.org).
5. Por reta uzo, sufichas kompletigi kaj sendi la chi-subajn informojn (nur la ghustatempa ricevo de la pago konfirmas la al/anighon – surloka pago principe NE eblas).

✂------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------

Familia nomo : . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

Antaùnomo (persona nomo) : . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

Naskighdato : . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

N-ro kaj strato : . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

Landa + urba kodo : . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

Tel. N-ro : . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

Retadreso : . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

Legis kaj komprenis, konsentas pri la an/alighkondichoj kaj hodiaù pagas la sumon da . . . . . . . . . . EUR

An/alighas al : . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

Dato de la arangho : . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

Eventualaj atentigoj kaj elektoj :

Dato de la subskribo : . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

Subskribo : . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .